

# **Protokolo de estrara interkonsiliĝo de Norvega Esperantista Ligo ĵaŭdon la 28an de junio 2012, per Skype.**

(Protokolo aprobita la 30an de aŭgusto 2012.)

## **Partoprenis:**

Jardar Eggesbø Abrahamsen en Trondheim  
Anne Karin Bondhus en Bryne  
Eli Eriksen Fitjar en Töreboda  
Ulf Chr. Lunde en Os en Hordaland (escepte de partoj de punkto 3)  
Mario Machlik en Tromsø

## **0. Tagordo**

Aprobita.

## **1. Aprobo de la protokoloj de la pasintaj interkonsiliĝoj la 27an de aprilo kaj 24an de majo 2012**

Aprobitaj.

## **2. Ekonomio**

La kasisto raportis pri la ekonomio.  
Skagen vekst: 31669 kr  
Skagen høyrente: 61370 kr

## **3. Broŝuro**

La broŝuro «Oppdag esperanto» nun pretas elektronike. Ni eldonos 1500 ekz, kio kostos proksimume 3500 kronojn kaj eventualajn aldonajn kostojn. Ni demandas al la plej grandaj kluboj, ĉu ili volas kontribui ekonomie. NEL mem pagos minimume 1000 kr, kiom korespondas al la donaco de Elna Matland, kiu estis celata precipe por tia broŝuro.

## **4. Jarkalkulo kaj jarraporto 2011**

Mankas nur kelkaj detaloj por la jarkalkulo. La estraro aprobas ĝin kondiĉe ke la detaloj enskribiĝos, kaj ke la revizoro ĝin aprobos. Ankaŭ al la jarraporto mankas nur kelkaj detaloj, kiujn ni pretigos rete.

## **5. Vortaro**

Kjell Heggvold Ullestad ne plu laboras pri la Norvega-Esperanta vortaro. En sia raporto li klarigis i.a. ke la materialo por la vortaro estas kolektita laŭ inversa metodo, kio rezultigas ke unuflanke mankas multaj kutimaj norvegaj vortoj, aliflanke estas tie multaj strangaj Esperantaj vortoj. Li rekomendas ne unuavice redakti laŭ la nuna materialo, sed decidi pri la necesaj norvegaj vortoj kaj laŭeble utiligi la materialon.

La vortaro origine estas projekto de Grupo Esperantista de Trondheim. NEL petas GET doni siajn konsilojn.

## **6. Norges Sosiale Forum**

Norges Sosiale Forum petas subtenon por Globaliseringskonferansen. Pro sia neŭtraleco NEL ne plu membras. Ni ankaŭ ne havas multe da mono, kaj ni decidis ne subteni la konferencon.

## **7. Dato por estrara interkonsiliĝo**

La venonta estrara interkonsiliĝo okazos la 30an de aŭgusto 2012.

## **8. Eventualajoj**

Nenio.

La interkonsiliĝo daŭris 19:30–22:15.

La venonta interkonsiliĝo okazos la 30an de aŭgusto 2012.

Raportis Jardar Eggesbø Abrahamsen.